diris al si Alicio tre severe. " Mi ordonas al vi tuj ĉesi la ploron." Ŝi havis la kutimon sin tre bone konsili (sed tre malofte agis laŭ la konsilo !) kaj kelkfoje riproĉis sin tiel forte, ke ŝi efektive devis plori ; kaj ŝi unu fojon punfrapis sin sur la vango pro la ofendo ke ŝi trompis sin dum iu vetludo kiun ŝi ludis kontraŭ si mem. (Nia Alicio ja estis neordinara infano kaj tre ŝatis ŝajnigi ke ŝi estas du personoj.) " Sed tiu ŝajnigo ne utilus nun "—si malĝoje ekpensis—" ĉar ja restas da mi apenaŭ sufiĉe por fari eĉ unu respektindan personon ! "

Baldaŭ tamen ŝia rigardo falis sur vitran skatoleton, kiu kuŝas sub la tablo : malferminte ĝin, ŝi trovis interne tre malgrandan kukon, sur kiu oni markis (per korintoj) la vortojn : " Manĝu Min."

" Nu," diris Alicio, " mi vin manĝos ! Se vi igos min kreski, mi povos atingi la ŝlosilon ; kaj, se male okazos, mi povos rampi sub la pordo. Ambaŭokaze mi eniĝos la ĝardenon, kaj se nur okazos *tio*, ne tre gravas la kielo." Sekve ŝi manĝis peceton de la kuko dirante al si " Laŭ kiu direkto, laŭ kiu do ? " kaj tenante la manon sur la verto por palpe sciiĝi ĉu ĝi plialtiĝas aŭ male ; kaj tre surprizis ŝin la konstato ke ŝi restas konstante samalta. Kiam oni manĝas kukon, tio ja okazas ordinare, sed Alicio jam tiom alkutimis atendi ke nenio okazos krom la neordinara, ke estis por ŝi tede kaj malinterese